# *Vizitas Díaz-Canel sociajn projektojn en Artemisa.*



La unua vicprezidento Miguel Díaz-Canel vizitis Artemisa, nova provinco nur kvinjara, najbare de Havano, kie oni plenumas intensan konstruan kaj rekonstruan programon por socikultura servo al la civitanaro.

Interalie,  li konsentis ke la konstruado de bulvardo en la areoj kie funkcias la wi-fi servo, kongrue kun la informadik- procezo okazanta en la kuba socio, ebligos integri ?iujn aliajn projektojn, kiuj fortigos la tradiciojn.

Aliaj projektoj rilatas al la rekonstruo de kinejoj, hoteloj, plus la agadoj de novtipaj laborformoj kiel la kooperativoj, la presejo, domo de muziko kaj aliaj kulturcentroj.

Li insistis pri la bezono ke la eblecoj devas ampleksi?i al la vila?oj kaj kamparaj komunumoj, ne nur al la provinca ?efurbo samnoma Artemisa, kiu sin preparas por festi sian datrevenon.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/77777-vizitas-diaz-canel-sociajn-projektojn-en-artemisa

**Radio Habana Cuba**